

Novaj klubmembroj / Neue Vereinsmitglieder

Ni elkore bonvenigas en nia klubo la jenajn novajn membrojn: / Wir heißen die folgenden neuen Mitglieder herzlich in unserem Verein willkommen:
Waltraud Homann; Hermann Gebhards; Günther Hinrichs.

Veranstaltungshinweise

Unsere **wöchentliche Esperanto-Übungsstunde für Fortgeschrittene** findet statt donnerstags ab 19:45 Uhr in der *Evangelisch-lutherischen Kirchengemeinde Brake*, Kirchenstraße 24, 26919 Brake. Unsere **monatlichen Vereinstreffen** finden **am dritten Mittwoch des Monats** statt (wenn nicht schon eine andere Vereinsveranstaltung an einem anderen Tag des Monats stattfindet). Unsere **Jahreshauptversammlung** findet statt am 09.02.2006 um 20:00 Uhr in der Gaststätte *Landhaus*, Am Stadion 4, 26919 Brake. Unser **Besenwerfen (balail-jetado)** ist am **18.03.2006** ab 14:30 Uhr in Rodenkirchen (bitte spätestens drei Wochen und einen Tag vorher anmelden). Aktuelles und Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen.

Außerdem:

24.02.-02.03.2006	Sprachkurse im Internacia Centro Herzberg (ICH)
07.-10.04.2006	Sprachkurse im Internacia Centro Herzberg (ICH)
10.-17.04.2006	22-a Printempa Semajno Internacia, St. Andreasberg
02.-05.06.2006	Deutscher Esperanto-Kongress, Braunschweig
29.07.-05.08.2006	91. Esperanto-Weltkongress, Florenz, Italien

Kiu volas partopreni, bonvolu informi nin.

Impressum:

Zeitschrift: Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
Erscheinungsweise: dreimal jährlich als Druckausgabe und elektronische Ausgabe, Netzseite:
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

Herausgeber: Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion: Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden): Landessparkasse zu Oldenburg
BLZ 28050100
Kontonummer 298174
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 15

ISSN 1861-3330

Feb. – Mai 2006

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



“Alte sur la flava ĉaro Esperanto-ĉaro“: Ralph Glomp kantas ŝlagrojn en la lingvo internacia dum la procesio de la fiaro de Rodenkirchen
„Hoch auf dem gelben Wagen Esperanto-Wagen“: Ralph Glomp singt Schlager in der internationalen Sprache beim Rodenkircher Marktumzug

Mario instruas Esperanton al lerneĵ-laborgrupo de Rodenkirchen

Ekde Septembro 2005 nia junular-prizorganto kaj diplomita Esperanto-instruisto Mario instruas Esperanton kadre de la komuna lerneĵ-laborgrupo *Esperanto* de la malaltgrada kaj mezgrada lernejoj de Rodenkirchen. La instruado okazas po unu posttagmezo en semajno kaj ampleksas 35 lecionojn. La kurs-enhavo estas ankaŭ interrete je <http://www.maio.de/EOAG>. En la fino de la lerneĵ-duonjaro la ĉirkaŭ 20 gejunuloj estos lernintaj sufiĉe por ĉiutagaj interparoloj en Esperanto kaj ekhavos partopren-atestilon. Ni dankas al la lernejestro Holger Briese por la subteno de la projekto kaj al Mario por lia engaĝiĝo. – Andreas

Mario lehrte Esperanto in Rodenkircher Schul-Arbeitsgemeinschaft

Seit September 2005 lehrt unser Jugendbetreuer und diplomierter Esperanto-Lehrer Mario Esperanto im Rahmen der gemeinsamen Arbeitsgemeinschaft *Esperanto* der Haupt- und Realschule Rodenkirchen. Der Unterricht findet an je einem Nachmittag pro Woche statt und umfasst 35 Lektionen. Den Kursinhalt gibt es auch im Netz unter <http://www.maio.de/EOAG>. Am Ende des Schulhalbjahres werden die etwa 20 Jugendlichen ausreichend gelernt haben für Alltagsgespräche auf Esperanto und eine Teilnahmebestätigung erhalten. Wir danken dem Schulleiter Holger Briese für die Unterstützung des Projektes und Mario für seinen Einsatz. – Andreas

La 2-a Rata Rendezuo en Hameln (13-a de Novembro 2005)

El nia grupo Unterweser ni (Alke, Anne kaj Andreas) partoprenis en la dua Rata Rendezuo, al kiu Heinz Wilhelm Sprick el la Ratkaptisa Bando de Hameln estis invitinta najbarajn kaj amikajn Esperanto-grupojn kaj esperantistojn. Por salutrinkaĵo la ĉirkaŭ 20 partoprenantoj renkontiĝis unue en la gastejo *Sumpflume* (marĉfloro), kiu estas ankaŭ la kunveno de la loka grupo. Poste ni vizitis la en 812 fonditan katedralan preĝejon. Ĝian historion rakontis Thomas Heberlein. El la preĝejturo ni ĝuis belan elrigardon al Hameln. Krome en la katedrala preĝejo ni vidis pribilditan ekspozicion pri devigitaj laboristoj en la regiono dum la dua mondmilito. Ni kune tagmanĝis en restoracio de italaj kaj grekaj specialaĵoj. Pliaj programeroj estis promeno tra la malnova urbocentro kaj la vizito de la tiel nomata *Hochzeitshaus* (geedziĝdomo), konstruaĵo el la Vezer-Renasanco. Tie ni faris rondiron tra la *Erlebniswelt Renaissance* (Travivaĵmondo Renesanco). Tio estas virtuala prezento de homoj, malkovraĵoj, elpensaĵoj kaj ĉiutaga vivo en la renesanco, tiu sur la antikvo baziĝanta movado kultura inter la 14-a kaj 16-a jarcentoj. Fina programero estis de Reinhard Burgmann prezentita lumbild-prelego pri Litovio. En ĝia ĉefurbo Vilno li estis partopreninta, kiel ankaŭ ni tri, en 2005 la Universalan Kongreson de Esperanto. Ni dankas la Ratkaptistan Bandon por tiu ĉi plia amuza tago en Esperantujo. – Alke, Anne, Andreas

Enigma

	1	2		4	5	6
1			12			
2		10		7		11
3					13	
4						
5			8			
6			9			

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de Afrika lando.

Das zweite „Rata Rendezuo“ („Ratten-Treffen“) in Hameln (13.11.2005)

Von unserem Verein nahmen wir (Alke, Anne und Andreas) an dem zweiten *Rata Rendezuo* teil, zu dem Heinz Wilhelm Sprick von der Hamelner *Ratkaptisa Bando* (Rattenfänger-Bande) benachbarte und befreundete Esperanto-Gruppen und Esperantisten eingeladen hatte. Zunächst trafen sich die etwa 20 Teilnehmer zu einem Begrüßungsgetränk in der Gaststätte *Sumpflume*, die auch der Versammlungsort der örtlichen Gruppe ist. Danach besichtigten wir das 812 gegründete Münster. Dessen Geschichte erzählte Thomas Heberlein. Vom Münsterturm aus genossen wir einen schönen Ausblick auf Hameln. Außerdem sahen wir im Münster eine Bilderausstellung über Zwangsarbeiter in der Region während des Zweiten Weltkriegs. Wir aßen gemeinsam zu Mittag in einem Restaurant mit italienischen und griechischen Spezialitäten. Weitere Programmpunkte waren ein Spaziergang durch das alte Stadtzentrum und der Besuch des *Hochzeitshauses*, einem Gebäude der Weser-Renaissance. Dort machten wir einen Rundgang durch die *Erlebniswelt Renaissance*. Das ist eine virtuelle Darstellung von Menschen, Entdeckungen, Erfindungen und Alltagsleben in der Renaissance, jener auf der Antike beruhenden kulturellen Bewegung zwischen dem 14. und 16. Jahrhundert. Abschließender Programmpunkt war der von Reinhard Burgmann präsentierte Diavortrag über Litauen. In dessen Hauptstadt Wilna hatte er, wie auch wir drei, in 2005 am Esperanto-Weltkongress teilgenommen. Wir danken der *Ratkaptista Bando* für diesen weiteren unterhaltsamen Tag im Esperanto-Land. – Alke, Anne, Andreas

Horizontale

1: membro [sen finaĵo]; **2:** nepersono [sen finaĵo]; **3:** tropika marĉa arbaro [sen finaĵo]; **4:** iom post iom kreski; **5:** artikolo; **6:** homo, kies patro kaj patrino mortis; **7:** inversdirekte; **8:** sovaĝa mambesto simila al hundo [4 literoj; sen finaĵo]; **10:** persono [sen finaĵo]; **12:** sovaĝa porco [sen finaĵo]; **13:** artikolo [sen apostrofo]

Vertikale

1: mesaĝisto de Dio; **2:** maljes; **4:** alfiksi aĵon al alia per sekiĝa substanco; **5:** prefikso por „antaŭ tre, tre longa tempo“; **6:** prefikso por „denove“; **9:** aŭtosigno de Frankfurt/Main; **10:** tia, ke oni ne volas elspezi sian monon [sen finaĵo]; **11:** ekstera parto de buŝo; **12:** monda organizaĵo de nacioj (angla mallongigo); **13:** longmezur-unuo [sen finaĵo]

Schloss. Die Schlossführerin erläuterte uns seine wechselhafte Geschichte auf deutsch während eines Rundgangs durch mehrere Säle. Sehr hilfreich war, dass Hellmut ins Esperanto übersetzte und Alke Esperanto-sprachige Broschüren über das Schloss vorbereitet und



Donactransdono / Geschenkübergabe

verteilt hatte. Graf Anton Günther (1583-1667) und Herzog Peter Friedrich Ludwig (1755-1829) beeinflussten die Entwicklung des Schlosses am meisten, das seit 1607 aus einer wehrhaften Wasserburg in eine Residenz umgewandelt wurde. Nach Abdankung des letzten Großherzogs 1918 wurde das Mobiliar vollständig entfernt, und 1921 wurde das Schloss zu einem Museum. Gemälde von Johann Wilhelm Tischbein (1751-1829) sind im Idyllenzimmer. Auch der sehr große neobarocke Schlosssaal im „Theaterflügel“ enthält Gemälde: Sie wurden vom Bremer Maler Artur Fitger (1840-1909) angefertigt und zeigen Sagen und Legenden aus der Oldenburger Geschichte. Nach dem Rundgang stärkten sich die Esperantisten in einem benachbarten Restaurant. Es folgte ein Bummel über den Weihnachtsmarkt, und danach gab es leckere Kuchen, Kaffee und Tee bei Elfriede. Im Namen der Esperanto-Gruppe Bremen überreichte ihr Vorsitzender Hellmut unserer Vereinsvorsitzenden Anne Geschenke zu unserem zehnjährigen Vereinsjubiläum: einen Esperanto-Wimpel, der künftig auf Sitzungstische gestellt wird, und ein Buch über Esperanto-Grammatik. Danke! Und wir danken allen, die zu dieser sehr schönen weihnachtlichen Zusammenkunft beigetragen haben. – Andreas

Besuchstipp: Deutsches Auswandererhaus in Bremerhaven

Ende November 2005 war **Robert Bogenschneider**, Esperanto-Gruppe Konstanz, bei unserem Verein zu Gast. Er, Alke und Andreas besuchten das nur einige Wochen zuvor eröffnete **Deutsche Auswandererhaus** in Bremerhaven. Dort wird nahezu lebensecht das Schicksal von Auswanderern vermittelt. Unbedingt sehenswert!

– Alke, Andreas

Robert, Alke, Andreas, Jessica, Kerstin, Mario in Rodenkirchen



Nia partopreno en la procesio de la foiro de Rodenkirchen 2005

La 1-a de Oktobro 2005 ja estis la por-Esperanta Ago-Tago. Sed ĝin anticipis nia klubo Esperanto-Gruppe Unterweser je unu semajno. Kaj tio okazis jene: La **24-an de Septembro 2005**, nia klubo partoprenis en la procesio de la 872-a foiro de Rodenkirchen per la ornamita procesi-ĉaro numero 17, kiu estis veturigata de Jürgen Frerichs. Ni estis vestitaj per nigraj T-ĉemizoj kun surflokitaĵ (surpresitaĵ) okulfrapa blanka-flava Esperanto-prioritatrafiksigno



Ĉiam proksime al la ĉaro kaj al la publiko: la marŝant-grupo / Immer dicht am Wagen und am Publikum: die Fußgruppe

antaŭflanke kaj flava *Unterweser Germanio* dorsflanke. Je la ĉe-ĉare skribita devizo *Mit Musik und ESPERANTO um die Welt* (per muzik' kaj ESPERANTO tra la mond'), ni ĝojigis la publikon per ŝlagroj Esperantlingve kantataj de nia gasto Ralph Glomp el Hamburgo. Sur lia T-ĉemizo kompreneble estas skribita *Untereibe Germanio* (Untereibe signifas malsupran fluon de la rivero Elbe, ĉe kiu situas Hamburgo). Dum la cirkaŭ naŭdek-minut-daŭra procesio ĉe bona vetero, Ralph prezentis la plej bonon el sia riĉa repertuaro. Dume la aliaj, el ili ankaŭ niaj gastoj Elfriede Coburger el Oldenburgo – ŝi estas anino de la Esperanto-Grupo Bremen – kaj Vladimir Meškov el Krasnojarsko (*Jenissej Rusio*) iom post iom disdonadis dudek kilogramojn da sukeraĵoj kaj ankoraŭ nekonatan kvanton da trinkaĵoj. Tamen, ni devis atentigi pri tio, ke ni ne tro frue estu jam disdonintaj ĉiom (“Die Bonbons sind fast alle, und es ist noch so viel Rodenkirchen vor uns” – la bombonoj estas preskaŭ elĉerpiĝintaj, kaj estas ankoraŭ tiom da Rodenkirchen antaŭ ni). Ĉar ni estis ĉirkaŭ dudekope kaj tial sur-ĉare estis sufiĉe malvaste, kelkaj el ni partempe piede akompanadis la ĉaron kaj enmanigadis centojn da Esperanto-inform-paperoj al la entuziasmaj ĉeestantoj. Post la procesio ni forgesis informiĝi pri ebla premio por nia ĉaro. Ni unue kune kafumis ĉe Kerstin kaj Mario kaj poste promenis tra la foirplaco. Ni dankas ĉiujn, kiuj kontribuis al tiu ĉi sukcesa kaj amuza prezento, aŭ pli trafe: anticipita Ago-Tago. – Andreas

Unsere Teilnahme am Rodenkircher Marktumzug 2005

Der 1. Oktober 2005 war ja der Aktionstag für Esperanto (*Ago-Tago*). Aber unser Verein Esperanto-Gruppe Unterweser legte ihn eine Woche vor. Und das kam so: Am **24. September 2005** beteiligte sich unser Verein an dem Umzug des 872. Rodenkircher Marktes mit dem geschmückten Umzugswagen Nummer 17, der von Jürgen Frerichs gefahren wurde. Wir waren bekleidet mit schwarzen T-Hemden mit aufgeflockten auffälligem weiß-gelbem Esperanto-Vorfahrtsschild auf der Vorderseite und gelbem *Unterweser Germanio* auf der Rückseite. Unter dem am Wagen stehenden Motto *Mit Musik und ESPERANTO um die Welt* erfreuten wir das Publikum mit Schlagern, die auf Esperanto von unserem Gast Ralph Glomp aus Hamburg gesungen wurden. Auf Ralphs T-Hemd stand natürlich *Untereibe Germanio*. Bei gutem Wetter bot Ralph während des etwa neunzigminütigen Umzugs das Beste aus seinem reichen Repertoire. Unterdessen teilten die anderen, unter ihnen Elfriede Coburger aus Oldenburg – sie ist Mitglied der Esperanto-Gruppe Bremen – und Wladimir Meschkow aus Krasnojarsk (*Jenissej Rusio*) nach und nach etwa zwanzig Kilogramm Süßigkeiten und eine noch unbekannte Menge an Getränken aus. Allerdings mussten wir aufpassen, dass wir nicht zu früh alles austeilten („Die Bonbons sind fast alle, und es ist noch so viel Rodenkirchen vor uns“). Da wir etwa zu zwanzig waren und es daher ziemlich eng auf dem Wagen war, gingen zeitweise einige von uns zu Fuß nebenher und händigten den begeisterten Anwesenden Esperanto-Infozettel aus. Nach dem Umzug vergaßen wir, uns über einen etwaigen Preis für unseren Wagen zu erkundigen. Wir tranken zunächst zusammen Kaffee bei Kerstin und Mario und bummelten anschließend über den Markt. Wir danken allen, die zu dieser gelungenen und unterhaltsamen Vorstellung, oder treffender: zu diesem *vorweggenommenen Aktionstag*, beigetragen haben. – Andreas

Vizit-konsileto: *Deutsches Auswandererhaus* en Bremerhaven

Fine de Novembro 2005 **Robert Bogenschneider**, Esperanto-Gruppe Konstanz, gastis ĉe nia klubo. Li, Alke kaj Andreas vizitis la nur kelkajn semajnojn antaŭe malfermitan **Deutsches Auswandererhaus** (germanan elmigrinto-domon) en Bremerhaven. Tie estas preskaŭ vivreale perata la sorto de elmigrintoj. Nepe vidinde! – Alke, Andreas



Andreas, Robert kaj Alke en *Deutsches Auswandererhaus*

Kristnaska kunveno en Oldenburg (17-a de Decembro 2005)

Propran Esperanto-klubon ne havas Oldenburg. La plej multaj el la tieaj parolantoj de la lingvo internacia estas membroj de la kluboj de Unterweser aŭ, kiel ekzemple Elfriede, Bremen. Por kristnaska kunveno ŝi estis invitinta al Oldenburg esperantistojn de la regiono, de Groningen kaj de Frislando. Post salutrinkaĵo ĉe ŝi, 21 esperantistoj ekiris al la urbocentro kaj vizitis la kastelon de Oldenburg. Ĝian ŝanĝiĝeman historion klarigis germane la kastel-gvidistino dum rondiro tra pluraj salonoj. Tre helpeme estis, ke Hellmut tradukis en Esperanto kaj Alke estis preparinta kaj disdoninta Esperantlingvajn broŝurojn pri la kastelo. Grafo Anton Günther (1583-1667) kaj duko Peter Friedrich Ludwig (1755-1829) plej multe influis la evoluon de la kastelo, kiu ekde 1607 estis transformita de defenda akvokastelo en rezidejon. Post abdiko de la lasta grandduko en 1918, la meblaro estis forigita komplete, kaj en 1921 la kastelo iĝis muzeo. Pentraĵoj de Johann Wilhelm Tischbein (1751-1829) estas en la idilio-ĉambro. Ankaŭ la tre granda novbaroka kastel-salono en la "teatro-alo" entenas pentraĵojn: Ili estis faritaj de la bremena pentristo Artur Fitger (1840-1909) kaj montras mitojn kaj legendojn el la historio de Oldenburg. Post la rondiro la esperantistoj refreŝigis sin en najbara restoracio. Sekvis promeno tra la kristnasko-bazaro, kaj poste estis bongustaj kukoj, kafe kaj teo ĉe Elfriede. Nome de la Esperanto-Grupo Bremen,



Antaŭ la kastelo de Oldenburg / Vor dem *Oldenburger Schloss*

ĝia prezidanto Hellmut transdonis al Anne, prezidantino de nia klubo, donacojn pro nia dekjariga klubjubileo: Esperanto-flagrubandon, kiu estas starigota sur kunsidtablojn, kaj libron pri Esperanto-gramatiko. Dankon! Kaj ni dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu ĉi tre bela kristnaska kunveno. – Andreas

Weihnachtliche Zusammenkunft in Oldenburg (17.12.2005)

Einen eigenen Esperanto-Verein hat Oldenburg nicht. Die meisten der dortigen Sprecher der internationalen Sprache sind Mitglieder der Vereine Unterweser oder, wie z. B. Elfriede, Bremen. Zu einer weihnachtlichen Zusammenkunft hatte sie Esperantisten aus der Region, aus Groningen und aus Friesland nach Oldenburg eingeladen. Nach einem Begrüßungsgetränk bei ihr brachen 21 Esperantisten ins Stadtzentrum auf und besichtigten das Oldenburger